



ENHAVO

Enhavo.....	1
Kalendaro.....	1
Okazis.....	1
La ĵus alveninta eŭropa volontulo prezentiĝas.....	1
ATTAC-France kaj esperanto.....	2
Décès de Roger Cuquel, membre d'EKC.....	3
Okazos.....	4
Pri la manĝo-klaĉoj.....	4
Renkonto Martigues 2008	4
Kunlaboru kun La Krokodil'!.....	4

Kalendaro

25-an de okt : Debato en kafejo Le Baton à Palabre, 15 rue de Thionville.

Horo : de 18-a ĝis 20-a.

De la 2a ĝis la 4a de novembro: 4a Aŭtuna Renkontiĝo de KEA + Kaŝtanfesto (IV trobada de tardor i castanyada)

Estas plezuro anonci al vi ke Kataluna Esperanto-Asocio organizas sian 4an aŭtunan renkontiĝon kune kun la tradicia kaŝtanfesto en Vallbona d'Anoia la 2an, 3an, kaj 4an de novembro. Kiel kutime en tiaj renkontiĝoj, ni celas renkontiĝi kun kiel eble multaj esperantistoj kaj kunigi la novajn esperanto-lernintojn, praktiki la lingvon, kaj ĉefe ekskursi. Oni ankaŭ celebras la kaŝtanfeston kaj tiel oni manĝas kaŝtanojn, batatojn, kaj *panellets*, kaj trinkas muskatvinon.

La gastejo situas ĉe privata kastelo, meze de la naturo, kaj la eblecoj ekskursi estas tre belaj kaj interesaj.

En niaj renkontiĝoj partoprenas homoj ĉieajnaj, ĉiuagaj, kaj ĉiuspecaj, tiel ke la interrilatado kaj interŝanĝo de spertoj estas vere profitaj.

Vi povas aliĝi rete:

<http://www.esperanto.cat/autuno2007/>

La 8an de novembro, je la 18:30: Assemblée générale statutaire de EKC

Loko: ĉe CIDES, 1 rue Joutx Aigues.

La 15an de decembro: Tago de Zamenhof kaj esperanto-kulturo. Komuna tagmanĝo (12 h), kaj kultura programo posttagmeze: koncertoj kaj teatraĵo.

Loko : Maison de Quartier, 107 av. Arènes Romaines, 31300 Toulouse.

Rezervu vian lokon antaŭ la 4-a de decembro.

[<esperanto.toulouse@free.fr>](mailto:esperanto.toulouse@free.fr)

OKAZIS

La ĵus alveninta eŭropa volontulo prezentiĝas

Mi nomiĝas Przemek Wierzbowski (prononcu: pŝemek vjejbowski), mi estas 21-jaraĝa studento



Esperanto-Kultur-Centro

1 place des Avions, 31400 Toulouse

tel/fax 05 61 25 55 77

esperanto.toulouse@free.fr <http://esperanto.toulouse.free.fr/>

el pola-esperanta urbo Bjalistoko. Ĉi-jare en interreto mi trovis bonan okazon paŭzi la studadon por unu jaro kaj okupiĝi pri interesaj, esperantaj aferoj en Tuluzo. Tiu okazo nomiĝas Eŭropa Volontula Servo – programo de EU en kiu rajtas partopreni ĉiu junulo de la unio kaj de landoj kunlaborantaj kun ĝi. Oni devas simple trovi projekton en alia lando, skribi al ĝiaj organizantoj, plenigi kelkajn formalizaĵojn, poste atendi maltrankvile akcepton de la landa organizo kaj – forveturi. Elekteblaj projektoj estas tre diversaj, sed ĉiuj koncernas helpon al loka komunumo aŭ asocio, ekz. laboro kun infanoj en lernejo aŭ helpo al handikapuloj. "Volontulo" estas nek laboristo, nek ferianto, do oni ne ricevos salajron (malgraŭ ke estas mono por ĉiuj bezonataj elspezoj) kaj ne povos libertempi ĉiam, sed ricevas ion plej gravan – ĝojon helpi al aliaj kaj grandegan sperton.

Mi tute hazarde trovis interrete anoncon de Esperanto-Kultur-Centro pri EVS kaj tre volis ĝin partopreni; mirakle la lastan tagon antaŭ la limdato ĉiuj dokumentoj estis pretaj. Ĝis la 30-a de junio mi okupiĝos en Francio pri instruado de Esperanto en lernejoj, prelegoj, ekspozicioj, libroj en biblioteko kaj pri ĉio, kio helpas disvastigi Esperanton en la regiono.

En Tuluzo mi jam loĝas dum du semajnoj kaj ĉi tiu multkultura, vivoplena urbo tre plaĉas al mi kaj ĉiam denove min mirigas. Dume mi partoprenis la unuan manĝo-klaĉon, kie mi ekkonis junajn geesperantistojn, kaj kun Samia kiel ĉiĉeronino multe piediris tra la urbo. Mi esperas travivi ĉi-jare en Tuluzo la plej interesan tempon dank' al Esperantujo kaj post reveno, kun multaj spertoj, helpi organizi Universalan Kongreson en Bjalistoko en 2009. – Amike, Przemek.

ATTAC-France kaj esperanto

Résumé en français

L'université d'été d'Attac-France s'est déroulée du 24 au 28 août 2007 à Toulouse. 800 altermondialistes, dont quelques étrangers, ont participé aux nombreux ateliers proposés dans les sept filières du Manifeste Altermondialiste: solidarité, économie, démocratie, services publics, social, international, culture et médias.

Ce dernier domaine, concerné par l'espéranto, a fait l'objet d'un atelier: le débat sur le 'tout-anglais'. Sur une cinquantaine de participants, il y avait 3 espérantistes, et trois animateurs.

Guy Martin, espérantiste de St. Nazaire, a pu présenter son parcours personnel avec l'espéranto. Un papier d'Attac-Lyon a été distribué; ses quatre rédacteurs sont moitié pour, moitié contre l'espéranto, qui fait l'objet d'un long paragraphe.

Si l'université d'été 2008 a lieu de nouveau à Toulouse, il faudrait y tenir un stand, comme le font une quinzaine d'associations.

Fondita en 1998, tiu ĉi asocio enhavas hodiaŭ 20.000 membrojn. Ĝi celas popolan klerigadon per debatoj pri la damaĝoj de novliberalismo kaj cerbumas pri alternativa mondo. Ĉiujare okazas grava nacia renkontiĝo nomita «Somera universitato». Ĝi okazis ĉijare en Tuluzo: 800 partoprenantoj, 24-28 aŭgusto.

La plejmulto estis francaj membroj de Attac. Ili lernis pri ekonomiko, institucioj, Eŭropo... kaj proponis siajn ideojn pri socio, politiko....

En 2007 aperis la Alimondiĝa Manifesto, kiu analizas la sep bazojn de novliberalismo, kaj proponas konkretaĵojn por faligi ĝin. La temoj prezentitaj kaj diskutitaj estas: tutmonda solidareco, planeda ekologio, demokrata civitaneco, protektado de la publikaj servoj, sekureco ekonomia kaj socia, internacia porpaca kunlaboro, kultura diverseco.

La nura sesio en kiu temis pri esperanto nomiĝis: «Ĉu ĉio anglalingve?» (le tout-anglais). Dum unu horo kaj duono tri personoj prezentis la temon: avantaĝoj kaj problemoj uzi la anglan lingvon, rajto uzi la francan (Toubon-

leĝo de 1994). Attac-France ie skribis, ke en eŭropaj Attac-kunvenoj, ĉiu rajtas paroli sian propran lingvon, kaj iu tuj tradukas. Unu prezentanto diras, ke la freŝaj bakalaŭroj konas nur 600 anglajn vortojn. La du aliaj asertas, ke esperanto estas tute artefarita kaj tial ne povas funkcii. Unu eĉ diris, ke la lingvistoj tion diras.

La debato daŭris duonhoron. Tuj koleris J. Caubel: «Esperanto ne estas artefarita, ĉar ĝi entenas eŭropajn radikojn, bonvolu pruvi ke ĝi ne funkcias.» Guy Martin, esperantisto el St. Nazaire bone prezentis nian aferon kaj sian propran sperton; li konsilis informiĝi en la reto per «www.lernu», kaj proponis studi la temon esperanto dum la venontjara kunveno. Li proponis ankaŭ okazigi debaton en esperanto dum la planata renkontiĝo 2008 en Germanio.

La venonta someruniversitato verŝajne okazos denove en Tuluzo (universitato Le Mirail). Ŝajnas al mi, ke Attac ne montras grandan intereson por esperanto. Tamen kelkaj membroj aprobas ĝin.

Kelkaj partoprenantoj proponas grupiĝon de proksimaj lingvoj, ekz. la latinidaj, la ĝermanaj, en Eŭropo: ene de ĉiu grupo, oni parolu sian propran lingvon, la aliaj komprenas. Virino asertis, ke neniuj lingvoj estas neŭtrala, ĉar ĝi fontas el kulturo.

Robert Joumard (Attac-Rhône) disdonis tekston, kiun li skribis kun tri aliaj membroj pri la lingva problemo en Eŭropo (16.08.2007). Li diris, ke du verkintoj favoras al esperanto (tutpaĝe pritraktita en la teksto); la du aliaj ne.

Rimarkindas, ke okazos en Sarrebrück (1-6 aŭgusto 2008) eŭropa renkontiĝo de Attac. Ĉu ni iom enkondukos tie esperanton? Mi aŭdis, ke Chomsky diris: ju pli da lingvoj, despli da nekomunikado. Mi konas personojn, kiuj asertas la malon!

– Jacques Caubel le 1/09/2007

Décès de Roger Cuquel, membre d'EKC

C'est avec tristesse que nous avons appris le décès de Roger Cuquel, membre d'EKC de Cahors (46). Roger Cuquel, espérantiste de la première heure s'est éteint le dimanche 23 septembre à l'âge de 97 ans. La cérémonie religieuse a eu lieu à Cahors le mardi suivant. Son intérêt et sa passion pour l'espéranto ne l'ont jamais quittés. Nous adressons nos sincères condoléances à sa famille.

OKAZOS

Pri la manĝo-klaĉoj

Je la lasta manĝo-klaĉo, oni demandis ĉu iu volas volontuli por okazigi estontajn manĝo-klaĉojn, sed neniuj volontulis. Sylvie, nome de la komitato de nia asocio, sendis mesaĝon kiu klarigas la situacion kaj informas pri la venonta.

La krokodil peras la mesaĝon.

Saluton al ĉiuj,

Pasintan vendredon, okazis la lasta manĝo-klaĉo. Fakte, neniuj volontulis por zorgi pri tiu tasko por la venonta jaro.

Estas bedaŭrinde sed estas tiel.

Ni parolis pri tio kaj ni konkludis ke ne restas multe da eblecoj se ni deziras ankoraŭ renkontiĝi.

Do, ni proponas al vi provi anstataŭigi la oktobran manĝo-klaĉon per rendezuo en la memserva restoracio "Flunch" la 12-an de oktobro je la 20-a horo. Ĝi situas apud la metrohaltejo "Jean Jaures". Estas restoracio kie oni libere elektas tion kion oni deziras manĝi. Do, tio estas perfekta por ĉiu buĝeto, kaj la salono estas sufiĉe granda por ke oni povu trankvile paroli kaj klaĉi. Eble, la juna pola esperantisto kiu volontulas en Tuluzo sin prezentos. Evidente, tio ne havos saman ĉarmon kiel niaj kutimaj manĝo-klaĉoj sed estas pli bone ol nenio.

Ni vidos laŭ la nombro de homoj kiuj partoprenos ĉu ni daŭrigu tiun rendezuon aŭ ne en novembro.

Estas evidente ke ni estos tre kontentaj se iu inter vi sin proponas por zorgi pri la venonta(j) manĝo-klaĉo(j).

Ĝis la 12-a de oktobro.

– Sylvie, nome de la komitato de EKC.

Renkontiĝo en Martigues 2008

Post la sukcesa renkontiĝo en Bulonjo ĉe Maro en 2005, SAT-Amikaro kaj Esperanto-France decidis pri komuna aranĝo de esperanto en Francio. Ni do atendas vin en Martigues, ĉarma haveno okcidente de Marseille, dum paska semajnfino (de la 21a ĝis la 25a de marto 2008).

Vin atendas bunta programo, diversaj prelegoj, globluda konkurso, koncerto, teatraĵo, lingvo-festivalo, aranĝoj por infanoj, literaturaj anguloj, ekskursoj, kaj evidente, laborkunsidoj (membro-kunvenoj de SAT-Amikaro, Esperanto-France, FET, JEFO, FKEA), laborgrupoj pri informado, instruado, utiligo, ktp.

Venu, ne maltrafu la okazon praktiki esperanton en agrabla etoso kaj konatiĝi kun aliaj asocioj. Kontakti la sekretarion de Esperanto-Provence, kiu organizas la aranĝon:

Michel Cerisay, Résidence Trident Sud, H15

15 place des Vents Provençaux,

13140 MIRAMAS

mcerisay@gmail.com

– por la Organiza Komitato,

Renée Triolle, komisiito pri informado

KUNLABORU KUN LA KROKODIL'!

Ĉu vi ĉeestis en iu aranĝo rilata al Esperanto? Ĉu vi konas iun interesan retejon por esperantistoj? Ĉu vi estas skribema?

Sendu viajn kontribuojn al nia bulteno, tiel ĝi pliboniĝos! Kaj ne forgesu sendi viajn fotojn!

La retadreso de la redaktoro estas

pere@quintanasegui.com

Pere Quintana Seguí